

**Provenca
Esperanto-Federacio**
kvaronjara gazeto
144
printempo 2026



Leĝa depono ĉe BNF

ISSN 2609-5203

Federacia retejo

provenco.esperanto-france.org

Prezidanto

Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40

r.inaudi@free.fr

Aliĝkotiĝo (kun la gazeto) : 12€

> ĉeko al : **Esperanto-Provence**

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la kasisto

Marc Gallardo

Les Hespérides II Bât. B2

67 bd des Alpes- 13012 Marseille

gallardomarc@gmail.com

06 09 89 09 14

> aŭ bankĝiro

(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo

devas esti pagita al Esperanto-France

<https://esperanto-france.org/>

Redaktoro

Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93

ilarione13@outlook.fr

Grafikistino

Mh Bertucceli

mhbortucceli@gmail.com

**Limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**

15-a de junio 2026

bonvolu sendi al la supra retadreso



antaŭdankojn pro viaj kontribuadoj

Karaj legantoj,

Ĉi tiu printempa numero montras la viklecon kaj diversecon de nia movado.

De la entuziasmo de juna esperantistino, kiu partoprenos sian unuan Universalan Kongreson, ĝis la etoso de la Mediteranea Esperanto-Semajno, ni vojaĝas kune tra spertoj kaj renkontiĝoj.

La artikoloj kondukas nin plu, de Tanzanio ĝis Nepalo, dum lokaj iniciatoj – projekcioj ĉe Videodrome kaj prezento pri Lydia Zamenhof en Tulono – atestas la kulturen dinamikon de Esperanto-Provence.

Praktikaj informoj pri ekzamenoj kaj nia kutima distra paĝo, kruĉvortenigmo kaj recepto, kompletigas ĉi tiun riĉan enhavon.

Mi deziras al vi agrablan legadon kaj esperas baldaŭ renkonti vin dum niaj venontaj aranĝoj.

Amike,

La prezidantino

Rosy Inaudi

Fokuso

Jen, mi sentas preta por iri en la UNIVERSALA KONGRESO, tiun jaron, en GRAZ (Aŭstrio) de la unua ĝis la oka de aŭgusto.

Mi lernis Esperanton dum preskaŭ tri jaroj kun instruisto... mirinda profesoro... sinjorino Renée TRIOLLE.

Mi lernis sed ankaŭ mi interesiĝis relate al la filozofio de la lingvo: paco, frateco, klopodi helpo por la bunta mondo.

Hodiaŭ, kion mi atendas de tiuj tagoj en GRAZ?

Certe, retrovi la ombron de sinjoro ZAMENHOF en 1905 en Boulogne sur mer (unua internacia kongreso) pensi pri la deklaro je la fino:

«une langue pacificatrice, une langue construite avec ART», «l'auteur a renoncé à tout droit personnel sur la langue», «est esperantiste toute personne qui connaît et utilise l'Esperanto».

Jes, mi povas diri «mi estas esperantisto», kanti la himnon «Esperanto»

Bonvolu noti: post la kongreso, mi diros al vi miajn reagojn...

Enhavo

3	Raporto pri la membro-kunveno
3	Examens d'espéranto
4 - 9	Mediterranea Esperanto-Semajno
10	Unua Tanzania Esperanto-Safaro
11 - 15	Esperanto sur la tegmento de la mondo
16 - 17	Les vidéos en espéranto
17	Lydia Zamenhof à Toulon
18	Facila krucvortenigmo
19	Recepto
20	Agendo

ROQUEBRUNE-SUR-ARGENS À l'image des années précédentes, la Mediteranea Esperanto Semajno (Semaine espérantiste méditerranéenne) a réuni en ce mois de mars des stagiaires venus du monde entier.

Les Issambres

L'espéranto, une voix d'espoir et un trait d'union

PAR FRED M. / SAINT-RAPHAEL@NICEMATIN.FR



Aux Issambres, des Espérantistes du monde entier étaient réunis à l'occasion de la Mediteranea Esperanto-Semajno, pour une semaine d'échanges culturels en espéranto. PHOTO FRED M.

DU 14 AU 21 mars, quelque 70 personnes de toutes nationalités ont échangé dans la langue universelle créée en 1887 par le docteur Louis-Lazare Zamenhof, pacifiste polonais en quête de moyens d'apaisement entre les peuples.

À l'Hôtel Miléade du Val d'Esquaires, les membres d'Espéranto Provence avaient organisé comme chaque année, conférences, cours de perfectionnement, projections de documentaires ou de films, le tout en espéranto. Un véritable trait d'union linguistique entre les stagiaires qui leur a permis d'échanger sur de multiples sujets au cours de cette nouvelle Mediteranea Esperanto-Semajno (Semaine Espérantiste

Méditerranéenne).

Les jeunes adultes représentés

Peut-être en écho à une situation mondiale fragilisée, les membres d'Espéranto Provence et leur présidente Rosy Inaudi ont noté un nombre de participants un tiers plus important qu'en 2025, avec un surcroît de jeunes adultes, une présence stimulante pour la transmission de l'Espéranto et de ses valeurs.

Après son concepteur original et ses pratiquants, l'espéranto est un idiome à portée de tous, quel que soit l'âge ou l'origine linguistique. Par ailleurs, et pour faciliter son apprentissage, des cours en ligne gratuits sont

disponibles depuis le site internet Esperanto-france.org.

Autre encouragement pour les Espérantistes et leur foi en l'humanité, outre la multiplicité des cultures présentes lors de cette semaine riche en échanges, les stagiaires Russes et Ukrainiens ont participé côte à côte aux activités proposées, en toute entente. Preuve que la langue universelle peut être porteuse de paix et de compréhension entre tous, et donc pourragerait inspirer certains grands dirigeants de ce monde.

CONTACTS : Espéranto Saint-Raphaël : prezhono@hotmail.com et provenceesperanto@laposte.net

Article paru dans Var-Matin : Jeudi 19 mars 2026

Examens d'espéranto

Dimanche 14 juin 2026 au CIRA, 50 rue Consolat, Marseille(1er) arrêt Réformés-Canebière (à 15 minutes à pied de la gare Saint-Charles). Possibilité de passer les examens de FEI du 1er et 2ème degré. Inscriptions et café à 8h45, examens écrits dès 9 heures, repas sur place, oraux l'après-midi.

Plus de renseignements sur les examens sur FEI

Merci de s'inscrire auprès de triolle.renee@wanadoo.fr

de préférence avant le 18 juin .

Raporto pri la Membro-kunveno

Membro-kunveno de Esperanto-Provence okazis la 15an de marto en Les Issambres; Decidite estis altigi la jaran kotizon de 10 à 12 eŭroj. Elektita estis nova komitato, kiu elektis inter siaj membroj la novan estraron .



BELA, INSPIRIGA kaj BONEGETOSA estis la Semajno de MES

Renée Triolle

Tia, unu el la kursgvidantoj, Maŭrizio, taksas MES en sia mesaĝo de la 22a de marto.

Kiel organizanto, mi deziras danki ĉiujn, kiuj kontribuis al la sukceso. La organiza teamo, Marc Gallardo (gastigado, ekskurso); Rosi Inaudi, Thierry Spanjaard (administrado, financoj), Renée Triolle (programo) bele kunlaboras: ĉiu zorgas pri sia parto, la aliaj donas sian opinion, ne estas «ĉefo», kvankam tio estis la unua demando de la intervjuanto filmisto el Ukrainio! MES ne konkurencas la staĝejojn, kiel Kulturdomon en Gresillon aŭ Kvinpetalon en Bouresse, sed proponas tre kulturan semajnon, kie esperantistoj povas uzi sian lernitan lingvon. Apud la kursoj (Panoramo de la Esperanto-literaturo kun Pawel Fisher-Kotowski) kaj «Legi mikronovelojn» kun Maŭrizio Giacometto) dum komencantoj kaj komencintoj progresis sub gvido de Katalin Kovats (rezulton ili proponis dum la distra vespero, kie ĉiuj kombis sin aŭ lin). La staĝanoj mem proponis diversajn prelegojn: Denise (pri Kameruno),

Philippe (pri familiaj nomoj, t.e kiel nomi familianojn en diversaj kulturoj), Masayuki Kobayash pri Oomoto, Céline ludigis ludemajn homojn, Carmen gvidis ilin al la vidindaĵoj de Saint-Raphael kaj Fréjus. Brian ĉiĉeronis en la abatejo de la Celle. Ĉiam ĉeestis pli ol la duono de la cento da partoprenantoj kaj tre akuratis. Senprobleme, kaj sen peto, la homoj transportis la tablojn kaj seĝojn en la ĉefa salono. Apenaŭ aŭdiĝis krokodiloj (partoprenis homoj el 3 kontinentoj kaj pli ol dek landoj) diskutitaj estis «tabuaj temoj» en la t.n neŭtrala lingvo: rezisti militan propagandon, religio, komplotteorioj.

Jam notu, ke MES okazos denove venontjare, samperiode.



Raporto pri Mediteranea Esperanto Semajno 14a -21a de marto 2026.

Arlette Plutniak el Arras (Norda Francio)

Jam la lasta vespero, ĝi komenciĝas per dankoj al la organizantoj, ĝi finiĝos per dankoj al la partoprenantoj. Martine Demouy, kiu ĉiujare majstre organizas la sinsekvojn de la distra-arta vespero anoncas ke la hodiaŭa tago estas tago de feliĉo. Ŝia diro plene kongruas. Post la lastaj aplaŭdoj al la artistoj ĉiuj estis plenaj je feliĉo kaj emocio.

Kial tiu raporto pri la semajno komenciĝas per la fino ? Por pli bone aprezi ĝin kiel bonega deserto antaŭ bona festa menuo.

Jen la menuo de la festo: granda familio de preskaŭ 80 esperantistoj el 14 diversaj landoj alvenas en la bela hotelo Mileades en Les Issambres,

feliĉaj retrovi konatajn vizaĝojn: brakumoj, kisoj, interŝanĝoj ! Aldoniĝas la vivkondiĉoj: belega suno, mirinda hotelo kies dormo-ĉambroj rigardas al la tutproksima blua mediteranea maro aŭ al la montaraj plantaĵoj. Post bonvena aperitivo kaj klarigoj pri la semajna programo, la subvitra manĝosalono akceptas la babilemajn samideanojn, kiuj frandos la tutan semajnon la bongustaĵojn de la varia bufedo.

La kvin matenajn trinivelajn kursojn frekventos la esperantistoj laŭ sia antaŭa elekto.

Kun la fama hungara pedagogo Katalin Kovats studas 15 tutkomentantoj aŭ komencintoj.

En la dua nivelo, majstre gvidata de la polo Pawel Fischer-Kotowski, partoprenas preskaŭ 30 esperantistoj, kiuj trarigardos la evoluon de la esperanta literaturo.

En la tria nivelo gvidata de la belvoĉa itala pedagogo Maŭrizio Gia-



Mediterranea Esperanto-Semajno

cometti, 25 personoj ekzercas sin al verkado de mikronoveloj.

Inter la intensivaj kursoj, por iom ripozi la menson, kaf' kaj te' - paŭzoj kun kuketoj ebligas daŭran babiladon kaj viziton al la libro-servo.

La liberaj posttagmezoj permesas al ĉiuj, ĉu promeni, ĉu renkontiĝi en la hotela akceptejo por kafumado aŭ diversaj ludoj, ĉu viziti perbuse la apudajn urbojn.

London, Carmen Segarra vizitigas sian urbon Saint-Raphaël kaj ĵaŭdon, la belan urbon Fréjus.



La merkredan posttagmezon, duontaga ekskurso en la natura parko La Sainte-Baume, estas organizata por viziti la abatejon de La Celle. Nia surloka ĉiĉeronino iom timis kiam

ŝi vidis tiom da vizitantoj el diversaj landoj. Mirigis ŝin la lerta kaj preciza traduko de Brian Moon.



Ekde la 17a horo posttagmeze, estas proponitaj interesaj prelegoj de kelkaj partoprenantoj. Dimanĉon, la franco Philippe Planchon prezentas genealogian arbon en diversaj kulturoj kaj ĉefe parolas pri familiaj nomoj: estis tre klera kaj altnivela prelego.

Mediteranea Esperanto-Semajno

Lundon, Denise Happi-Fosso prelegas pri Kameruno.

Mardon, la ukraino Eŭheno Kovtonjuk legas kelkajn interesajn ukrainajn versojn.

Jaŭdon, Céline Bernard gvidas ludatelierojn.

Vendredon, la japano Masayuki Kobayaski parolas pri la japana nova religio Oomoto konata pro sia internacia perspektivo kaj uzo de Esperanto.

Tuj post la vespermanĝoj, kiuj farigas pli kaj pli bruemaj pro plezuro interŝanĝi kun unuj kaj aliaj neniam krokodilante, ni kuras al la granda salono por la distraj vesperoj.

Sabaton, dum la interkona vespero eblas danci dank'al la juna multtalenta Christophe Collay (Krikru) kaj lia malnova sveda muzikinstrumento.



Dimanĉon, Katalin Kovats prezentas vitroarton, pri kiu ŝi estas oficiale registrita. Pere de fotoj ŝi klarigas pri teknikaĵoj, materialoj kaj ekspozicias kelkajn belajn juvelojn.



Lundon, prelegas Maurizio Giacomo pri la vivo de Primo Levi, travivinto de holokaŭsto.

Mardon, okazas balo, kantoj kaj dancoj. Akompanas nin la bonaj muzikistoj de la familio Prezioso, Josiane kaj Marité kaj la bonhumura Krikru.



Mediterranea Esperanto-Semajno

Merkredon, Pawel Fischer-Kotowski pripensigas la ĉeestantaron pri la sekreta mondo de konspiriteorioj.

Ĵaŭdon, Jean Annet prelegas pri la duobla celo de Zamenhof, lingva kaj religia : Esperanto kaj Homarismo, ĉu universala religio eblas ?

Ni revenu nun al la deserto: la adiaŭa bunta vespero dum staĝanoj prezentas varian artan programeron, ĉerizo sur la kuko ! tiom bonkvalita ĝi estas ! Ne eblas ĉion rakonti nur kelkajn emocivekajn erojn :

La unua kurso kun Katalin stariĝas sur la scenejo belan frizejon, kie oni kombas ŝin, lin aŭ sin. Oni multe ridis !



La filino de la fama humurplena franca verkisto Raymond Schwartz,

Francine Schwartz majstre deklamas poemojn de la patro.

Kun Maŭrizio Giacometto, la talenta juna italo Tiberio Madonna prezentas sian verkitan skeĉon : « Ne tute sed duone » pri kiu li ricevis premion de la akademio.

Dum la tradicia disdono de la dankaj donacoj, ni kunkantas la ĉisuban kanzonon, kiun ni komponis por la okazo .

Tra tiu raporto vi espereble konscias pri la entuziasmo, kiu regis dum la semajno. Ni ankaŭ multe reklamis pri nia lingvo ekstere, vekante demandojn de bus-ŝoforoj, de eksteraj personoj, respondante al ĵurnalisto kaj fotisto, kiu aperigis bonegan artikolon en la loka gazeto.

Jes ja ni povas vivi sen Esperanto sed kun Esperanto la vivo tiom riĉas !

DANKOJN al vi



Mediteranea Esperanto-Semajno

1) Por Ludoviko

Ni volas danki vin, sinjoro Ludoviko,
Ni volas danki vin, per ĉi tiu kant'.
Ni volas danki vin, pro tiu renkontiĝo,
Ni volas danki vin, ni al vi diras dank'




2) Por la instruistoj

Ni volas danki vin, profesoroj karegaj,
Ni volas danki vin, progreson faris ni.
Ni volas danki vin, Pawel, Rico, Katalin,
Ni volas danki vin, pro kursoj talentaj.

3) Por la organizantoj

Ni volas danki vin, karaj organizantoj,
Renée, Marko, Thierry, kaj ankaŭ Rosy.
Ni volas danki vin, pro tiu renkontiĝo,
Dankon dankon al vi, ne eblas forgesi.



4) Por la helpantoj

Ni volas danki vin, la aktivaj helpantoj,
Ni volas danki vin, pro kaf' kaj te' - paŭzoj.
Ni volas danki vin, pro via sindonemo,
Ni volas danki vin, Monika kaj Simon'.

5) Por la muzikistoj

Kaj ni ne forgesu, la bonajn muzikistojn,
Ni volas danki vin, pro via bonhumor'.
Krikru kaj Marité, pro via lerta ludo.
Ĉiuj revenos ni la venontan jaron.



Laŭ la kanto Mi volas danki vin, s-ro Ludoviko de Georgo Handzlik.

Unua Tanzania Esperanto-Safaro

Partoprenu la Unuan Tanzanian Esperanto-Safaron, kiu vojaĝigas vin de Daresalamo tra la Nacia Parko Saadani, Ngorongoro, Serengeto, la Esperanto-Mezlernejo en Maramboko al Mũanzo, kie vi partoprenos la Unuan Landan Kongreson de Esperanto en Tanzanio post la 109-a UK. Tio estas unika okazo sperti la senkomparan pejzaĝon, plantaron kaj bestaron de Tanzanio kaj konatiĝi kun ties juna kaj vigla Esperanto-movado. Unu fojon en via vivo vi nepre devas viziti Tanzanion, kie vivis antaŭ du milinoj da jaroj en Ngorongoro la unuaj homoj. Ĉar la homaro estiĝis en Tanzanio, fakte iel ĉiuj homoj sur la Tero estas Tanzanianoj. Do venu hejmen!

https://allsprachendienst.ch/esperanto/files/Unua-Tanzania-Esperanto-Safaro-Broshuro_5zmlY0dz.pdf

La evento ankaŭ taŭgas por komencantoj aŭ komencontoj de Esperanto, ĉar dum la safaro intensive instruos Esperanton. Do, se vi venas kun via partnero, kiu ankoraŭ ne scipovas nian lingvon, ŝi aŭ li post reveno ankaŭ estos esperantisto.

Kun amikaj salutoj

Didi Weidmann

Boko Magengeni, Good Neighbourhoud Street. Mbweni, Kiondoni.

Dar Es Salaam

P.O.Box 60285 Kawe Dar Es SaLaam

Tel. +41796102572 (Schweizer Mobil-Nummer, D.M. Weidmann)

Tel. +255 760 093 754 (Mobil-Nummer Tansania, D.M. Weidmann)

E-Mail: didi@esperanto.ch

Adresse Schweiz: c/o Allsprachendienst Esperanto GmbH,

Freiestrasse 24a, 8610 Uster

Festnetz Schweiz (wird zu mir umgeleitet zum Schweizer Lokaltarif)

+41 44 251 50 25

Esperanto sur la tegmento de la mondo

Thierry Spanjaard



NEspA (Nepala Esperanto-Asocio) estas agnoskita kiel unu el la plej aktivaj Esperantaj organizoj en Azio. Ilia plej bone konata regula internacia agado estas la Internacia Himalaja Renkontiĝo, dum kiu ili piedirigas partoprenantojn en la Himalaja montaro.

Mi havis la ŝancon partopreni en la 15-a eldono de la Internacia Himalaja Renkontiĝo, kiu okazis de la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto 2026. Mi kaj kelkaj aliaj partoprenantoj decidis alveni surloke iom pli frue por havi tempon vizi-

ti Katmanduon kaj alkitimiĝi al la alteco, eĉ se la ĉefurbo de Nepalo sidas nur je 1350 metroj.

Katmanduo : bela sed brua kaj poluita urbo

La organizantoj de la Renkontiĝo estis tiel afablaj ke eĉ antaŭ la oficiala dato de la evento, ili strebis promeni nin la eksterlandanojn inter la multnombraj vidindaĵoj de la urbo kaj de ĝia valo. Do, en Katmanduo, ni vizitis multajn lokojn, inkluzive de la plej belaj hinduaj kaj budaj temploj. Por mi, la

Nepalo

plej impresaj lokoj estis la templo Paŝupatinat (श्री पशुपतिनाथ मन्दिर – Pashupatinath), kie Hinduistanoj kremacias mortintojn, kaj la budhista stupao Baŭdanato (बौद्धनाथ – Bodnath), kiu estas estas unu el la plej grandaj stupaoj de la mondo. Mi ankaŭ ege ĝojis la vizitojn de la malnovaj urboj Baktapuro (भक्तपुर- Bhaktapur) kaj Patano (पातन – Patan), ambaŭ agnozkitaĵ en la listo de mondaj heredaĵoj de Unesko.

Fakte, Katmandu estas ege ekzotika por Eŭropanoj, ĉefe tiuj kiuj ne kutimas pri Suda Azio. La urbo estas granda (1,7 miliono da loĝantoj) sed evidentas ke ĝi estis konstruita antaŭ esti planita. La trafiko estas densa ĉefe kaŭze de la multnombraj motorcikloj. Pro tio, piediri sur la stratoj malfacilas kaj povas esti laciganta. Unue, la organizantoj, ĉefe Bharat kaj Prakash organizis ĉiujn transportojn por ni, sed post kelkaj tagoj, mi instalas la apon Pathao, kiu ebligas alvoki taksiojn, en mia poŝtelefono, kiu funkcias ambaŭ en la nepala kaj en la angla, do

mi iĝis ege pli sendependa. Ankaŭ la kombino inter Guglo Maps kaj Maps.me ebligas facile trovi sian vojon eĉ en la sinuaj stratoj de tiu malnova urbo.

Ek! Al la montaro!

Post kelkaj tagoj, alvenis tempo por la dua parto de la programo: la piedirado en Himalajo!

La organizantoj de NEspA elektis la Langtang (लाङ्गटाङ) regionon por piedirado. La Langtang regiono estas bone konita pro sia «nekomparebla naturbeleco, riĉa kulturo, kaj facile atingebla». Tiuj argumentoj spegulis la promocion de la loka turistoficejo, senhezite reuzita de NEspA. Fakte, Syabrubesi, nia komencpunkto, estas nur 110 km for de Katmandu. Tamen pro la malbona stato de la stratoj kaj la trafiko, ni bezonis 7 horojn por kovri tiun distancon aŭtobuse. Tuj post



la busvojaĝo, ni komencis nian piediradon, kaj atingis nian unuan etapon post iom pli ol tri horoj piede. Ni jam grimpis 530 metrojn la unuan duon tagon.

La sekva tago, ni iris de Bamboo hotelo ĝis Thangshyap vilaĝo, t.e. de la alteco 1980m ĝis la alteco 3185m, tiu signifas ke ni grimpis 1200m. Sed la vojo sekvas la valon de la rivero Langtang, kiu estas sufiĉe mallarĝa. Do la piedirvojo, eĉ se ĝis estas facila kaj ofte konstruita per ŝtuparo, supreniras 2070m kaj malsupreniras 885m dum tiu ĉi etapo.

Nia grupeto inkluzivis de 12 ĝis 6 nepalanoj laŭ la tagoj. La plej aktivaj estis Bharat, la prezidanto de NEspA, Indu, la antaŭa prezidantino kaj Prakash, la vicprezidanto de la asocio. Partoprenis ankaŭ aliaj

membroj de la asocio aŭ familianoj. La grupeto inkluzivis komence 9 eksterlandanojn, kiuj iĝis 7 post la unua tago. La grupo estis sufiĉe internacia, inkluzivanta belgon, hispanon, 2 germanojn, 1 usona-germaninon, 1 japanon kaj 3 francojn.

Por ĉiuj el ni estis nia unua fojo en Nepalo, kaj krom unu, ĉiu bone regis la internacian lingvon. La plej juna estis Kishiro, 22 jaraĝa japano, jam bona montgrimpisto kaj studento pri arkitekturo kaj la plej maljuna estis Heidi, kiu, je 84 jaroj, sin prezentis kiel mondcivitanino, kiu jam vivis dum multaj jaroj en Kambodĝo aŭ en Albanio antaŭ reveni al sia denaska Germanio. Ĉiuj en la grupo estis tute amika, kaj mi esperas, ke nia renkontiĝo en alteco kondukos nin al longdaŭra amikeco.

La tria piedirtago ebligis nin atingi la celon, vilaĝon nomatan Kyanjin Gompa, je 3865m da alteco. La vilaĝo estis tute suprenirante, enhavanta plurajn hotelojn konstruitajn kiel 3 aŭ 4 etaĝaj konstruaĵojn el ŝtono, kvankam ni estis meze de la montaro.



Nepalo

La Langtang valo estas sufiĉe kutima loko por piediradoj en Nepalo, faritaj de lokuloj aŭ de eksterlandanoj. Fakte, estas haltejoj post ĉiu horo aŭ du horoj da piedirado kie oni povas obteni trinkaĵojn, kaj manĝaĵon. Eĉ en ĉi tiuj malproksimaj lokoj, oni trovas espreskafon!

NEspA bone organizis la restadojn ĉiuj tagoj, elektanta kie eblis, sufiĉe komfortajn hotelojn.

Tiu signifas bone konstruitajn dormĉambrojn, ofte kun duŝoj kaj plurfoje eĉ kun varma akvo.

Tamen, tie ne estas petrolo, la ligno devas esti alportita de la valo sur homdorso aŭ per azenoj, la elektro estas ege malforta, do ne estas hejtiloj en la dormĉambroj. Mi mezuris temperaturon je 4 gradoj en mia dormĉambro. Sed, eĉ de kiam oni estas en la lito sub dikaj kovriloj, oni sentas sin komforta.

Dum la kvara tago, niaj organizantoj proponis diversajn eblecojn: iri ĝis la pinto Kyanjin Ri (4700m), aŭ ĝis la pinto Kyanjin Ri 2 (4300m), aŭ resti sur la altebenaĵo, proksime de la vilaĝo.



Kompreneble Kishiŝiro, dank'al sia bonega fizika taŭgeco, preskaŭ flugis ĝis la Kyanjin Ri, kun Bharat kaj la germana paro. Aliaj atingis la Kyanjin Ri 2, kaj mi elektis kun Martha kaj aliaj fari malgrandan promenadon, ĵus suprenirante la 4000m barilon.

Ni ĉiuj jam spertis, ke esperantistoj ŝatas fari grupfotojn en ĉiuj esperantaj aranĝoj. Kaj multaj jam scias ke ĉiuj Azianoj ŝategas grupfotojn. Do, dank'al tiu kombino, la grupestroj de NEspA trovis multajn oportunecojn por fari grupfotojn ĉiu tage: fronte de ĉiuj vidindaĵoj en Katmanduo, en tranoktejoj survoje dum la piedirado aŭ fronte de belaj Himalajaj pejzaĝoj.

Post du noktoj en Kyanjin Gompa, alvenis la tempo por malsupreniri. En du tagoj, ni revenis al Syabrubeŝi, retrovante komfortan hotelon

en vilaĝo, bonan aliron al elektro, interreto kaj varma akvo.

Reveno al konataj lokoj

La sekvan tagon ni reiris buse de Syabrubesi al Katmanduo, denove en 7 horoj. Post la montaro, Katmanduo aspektis kiel bone konata loko, eĉ se ni estis jam survoje por reveni hejmen. Intertempe, ekis la milito inter Usono, Israelo kaj Irano, kiu malfaciligis flugojn de Azio al Eŭropo. Kelkaj el ni devis lastminute, kaj ofte ege koste, ŝanĝi siajn planojn.

La evento estis enkadrigita de formala malfermo kaj de formala fermo, ambaŭ en Katmanduo. Mi maltrafis la formalan fermon ĉar mi jam devis forflugi el Nepalo por organizi la sekvan esperantan

aranĝon, la Mediteranean Esperanto-Semajnon.

Kaj poste ?

Post tiu vojaĝo restas multaj varmaj memoraĵoj: unue la afabla akcepto de ĉiuj en NEspA, kaj kiel Bahrat ĉiam trovis ĉiujn rimedojn por certigi, ke ni trapasis ege agrablan restadon en sia lando. Ankaŭ gravas la varma memoraĵo de nia facila amikeco inter la nepalanoj kaj ĉiuj eksterlandanoj, dank al nia ŝatata internacia lingvo!

NEspA organizas la Internacian Himalajan Renkontiĝon en paraj jaroj kaj alia aranĝo, pli turistema ol piediranta en malparaj jaroj. Ne hezitu partopreni en ili!



Les vidéos en espéranto rencontrent le succès à Marseille

Thierry Spanjaard

Comment attirer l'attention sur l'Espéranto ? On peut faire un article dans un journal, ou une présentation publique... mais il est difficile de se démarquer. Début janvier est un moment où il ne se passe pas grand-chose, chacun se remet des fêtes, se renferme pour l'hiver (même à Marseille), et les activités publiques sont limitées.

Tous ces éléments sont favorables

pour organiser facilement un événement espérantiste : le 8 janvier, Espéranto-Marseille a organisé une projection de vidéos en espéranto et sur l'espéranto.

Trouver des vidéos est facile, on peut chercher sur YouTube, sur Tubaro¹, ou plus généralement par n'importe quel outil de recherche. Il s'agit ensuite de bâtir un programme attractif. Le choix a été de

The poster features a dark green background. At the top, the text 'VIDÉOS EN ESPERANTO' is written in large, bold, white letters, with 'fenestro al la Mondo' in smaller yellow letters below it. To the right is a stylized globe with a large white star in the center. A white beam of light emanates from the camera icon on the left and points towards the globe. Below the globe, the date and time 'LE 8 JANVIER 2026 à 18 h' are written in yellow. Underneath that, the location 'VIDEODROME 2 · 49 COURS JULIEN 13006 MARSEILLE' is written in white. At the bottom, the slogan 'Plongez dans une soirée vive, surprenante et dépaysante!' is written in white. The bottom of the poster has a yellow horizontal band containing the 'VIDEODROME' logo on the left and the 'esperanto Matscat' logo on the right.

VIDÉOS EN ESPERANTO
fenestro al la Mondo

LE 8 JANVIER 2026 à 18 h
VIDEODROME 2 · 49 COURS JULIEN
13006 MARSEILLE

Plongez dans une soirée vive, surprenante et dépaysante!

VIDEODROME **esperanto Matscat**

<https://tubaro.aperu.net>

montrer des vidéos courtes entre une et six minutes en alternant les styles et en laissant quelques moments entre les vidéos pour échanger avec le public.

Pour pouvoir satisfaire à la fois un public espérantophone et non espérantophone, on prête attention à avoir des vidéos sous-titrées en français.

Dans notre cas, la projection a eu lieu à Videodrome 2, un lieu dédié aux vidéos qui prône le prix libre, l'accès au quotidien à une programmation exigeante et hétérogène au plus grand nombre. Videodrome 2

est un lieu hospitalier de toutes les formes cinématographiques et défend une programmation à vocation culturelle, philosophique et sociologique, en collaboration avec les différents acteurs socioculturels de Marseille. Bref, un lieu idéal pour communiquer sur l'espéranto !

Notre projection du 8 janvier 2026 a été un succès, avec nombre de spectateurs, même si la proportion de non encore espérantophones restait un peu trop faible.


Bref, une expérience à recommander, peut-être début janvier chaque année ?

Lydia Zamenhof à Toulon

Jeudi 26 mars, le relais socio-éducatif Peiresc de Toulon a invité Renée Triolle à présenter la vie de Lidia Zamenhof. Seule des enfants du créateur de l'espéranto à reprendre le flambeau de son père, Lidia (1904-1942), femme engagée a dédié sa vie à la promotion de l'espéranto, son enseignement par la méthode directe (une nouveauté à l'époque) mais surtout à la promotion de la Interna Ideo, humanisme pour un monde pacifié où les hommes, indépendamment de leur origine, race, religion ou couleur de peau peuvent vivre en harmonie. Une idée toujours d'actualité pour une solidarité internationale. De nombreuses questions, sur la langue équitable ont suivi, par exemple, où l'apprendre dans l'aire toulonnaise.

Facila krucvortenigmo

Marc Gallardo



- 1 - Malo de milito nun malfacila trovi en la tuta mondo
- 2 - Ne estas multe sed kun oni povas havi ion per 3 aferoj
- 3 - Kiu movas, tre uzata por niaj emerituloj
- 4 - Oni batalas kontraŭ, precipe virinoj
- 5 - Povas esti papere aŭ rete pli kaj pli
- 6 - Bona en parfumejo kelkafoje malbona en rubejo
- 7 - Oni devas esti sola por tio, ofte uzata en teatro
- 8 - Aktiveco de interŝanĝoj cele havi monon
- 9 - Li ne estas elekta, nova en Anglujo
- 10 - Rimedo por komuniki, ni lernas ĝin

1- Paco/ 2- Nentio / 3- Aktiveco / 4- Kilogramoj / 5- Letero / 6- Odoro
7- Monologo / 8- Negoco / 9- Monarkio / 10- Lingvo

Kalisonoj de Aix - Rosy Inaudi

Tre fama specialaĵo de Aix-en-Provence, ĉi tiuj estas delikataj migdalformaj bombonoj faritaj el kandizita melono kaj migdaloj.

Jen tradicia recepto:

Ingrediencoj : (por ĉirkaŭ 30 kalisonoj)

Por la pasto:

- 200 g da muelitaj migdaloj
- 150 g da kandizita melono
- 50 g da kandizita oranĝa ŝelon
- 150 g da sukero por glazuro
- 2 kuleroj da oranĝflora akvo

Por la glazuro:

- 1 ovoblanko
- 150 g da sukero por glazuro
- Kelkaj gutoj da citronsuko

Por la bazo:

- Nefermentitaj folioj (vafloj)

Preparado :

- 】 Fajne haku la kandizitan melonon kaj la oranĝan ŝelon.
- 】 Aldonu la muelitajn migdalojn kaj la sukeron por glazuro.
- 】 Enmiksi la oranĝfloran akvon.
- 】 Miksu ĝis vi havos glatan, iomete gluecan paston.

Formado de la kalisonoj

- 】 Rulu la paston ĝis ĉirkaŭ 1 cm dika.
- 】 Metu ĝin sur tukon da senfermenta pano.
- 】 Tranĉu ĝin en rombajn formojn (la tipa formo de kalisonoj).

Preparado de la glazuro

- 】 Miksu la ovoblankon kun la pulvora sukero kaj citronsuko ĝis glata.

Glazuro

- 】 Ŝmiru maldikan tavolon de glazuro sur ĉiun kalisonon.
- 】 Glatigu ĝin bone per spatelo.

Sekigado : Lasu ĝin aersekiĝi dum pluraj horoj (aŭ en tre malalta forno je ĉirkaŭ 100°C dum 5-10 minutoj kun la pordo iomete malfermita).

Konsiloj: Ju pli fajna kaj pli bone miksitaj la pasto, des pli fandiĝantaj en via buŝo estos la kalisonoj.

Ili konserviĝos dum pluraj semajnoj en hermetika ujo.



À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques "esperanto" :

1^{er} jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13)

Videodrome 2 - 49 cours Julien - 13006 Marseille

infos : *Thierry Spanjaard* - 06 09 18 28 51

<https://marsejlo.esperanto-france.org>

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau* - 06 82 53 52 02

14-17 mai 2026 - Méjannes-le-Clap (30) - INOE : Fin de semaine naturiste

Route de la Genèse - 30430 Méjannes-le-Clap

<https://www.esperanto-naturismo.org/>

En France

Pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<https://gresillon.org/>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

22-25 mai 2026 - Hérouville Saint-Clair (14) : Esperanto-Kongreso 2026

<https://kongreso2026.esperanto-france.org/>

8-14 août 2026 - Château de Grésillon : INOE - Semaine naturiste

<https://www.esperanto-naturismo.org/post/2026-08-14-20-sepa-ver-da-naturisma-semajno-en-greziljono>

Ailleurs en Europe et dans le monde

01-08 août - Graz (Autriche) :

111^e Congrès mondial d'Espéranto

<https://uk.esperanto.net/2026/>

12-19 sept. 2026 - Templo del Sol (Espagne) : INOE - Semaine naturiste

<https://www.esperanto-naturismo.org/post/2026-09-12-19-restado-en-naturista-centro-templo-del-sol-hispanio>